# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 9 Septembro, 2010

*Kara Leganto! Grave: revenis nia prezidinto Humberto Perez kaj li ne nur reaperis, sed ankaŭ prelegos novembre. Finfine reeĥis parizanoj – gesamideanoj de nia partnerurbo en la franca ĉefurbo. Pro la nepartopreno de usonanoj en UK en Havano nian duan raporton verkis ukraina samideano d-ro I. Galajĉuk (vidu Saluton! 11/09). Samtempe en Kubo okazis jarkunveno de E-instruistoj (vd sube).*

*La E-vivo bolas, sed, kiel iam diris prezidinto de UEA R. Corsetti, la stato de la IL en la mondo dependas de Usono, oni devas aldoni – de nia E-societo – unu el la plej fortaj en UŜdA. Do, ek!* –La Redakcio

## Konferenco de ILEI

En lundo, la 12-an de julio, malfermiĝis la 43-a Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Tio okazis en Matanzas, Kubo, precize 20 jarojn post la unua ekstereŭropa ILEI-konferenco, same okazinta en Kubo. Kun pli ol 60 partoprenantoj el 26 landoj, ĉi tio fariĝas la plej granda evento de ILEI en Ameriko. En siaj bonvenigaj vortoj la prezidanto de LKK Julián Hernández Angulo emfazis la gravan respondecon de la Esperanto-instruistoj en la movado kaj ilian ŝlosilan rolon por gvidi novulojn en la Esperanto-komunumon. Li finis kun la fido, ke la nuna konferenco permesos vastan interŝanĝon de spertoj kadre de sia temo "Edukado por kultura proksimiĝo". La seminario kunigis dekkvinon da junaj partoprenantoj el latin-amerikaj landoj kiel Argentino, Bolivio, Dominika Respubliko, Haitio, Meksiko, Nikaragvo, Panamo kaj Urugvajo. Radojica Petrovic enkondukis la celojn de la seminario, nome lertigi la partoprenantojn al efikaj kursgvidantoj kaj organizaj motoroj en siaj hejmlandoj. En sia parolado la prezidanto de ILEI Stefan MacGill emfazis, ke tri el la kvin konferencoj inter 2007 kaj 2011 estas ekstereŭropaj. Neniam antaŭe oni ĝuis konferencon de ILEI, tiom kulture diversan kaj kun salutinda ekvilibro inter la generacioj, kun solida bloko de kubaj kolegoj inter la partoprenantoj.

*–Stefan MacGill*

## UK en Havano (II)

Laŭ la peto de Saluton!-redakcio mi verkas mallongan raporton de miaj impresoj. Do, ni komencu de la inaŭguro: solena, sed ne pompa. Se en 1990 Fidel Castro mem salutis la mondan E-istaron, dirante ke la monda revolucio ne estas ebla sen la monda lingvo, ĉi jare ne aperis eĉ lia frato Raul, nur vic-ministro pri kulturo sidis en la salono de Zamenhof.

Plaĉis al mi la Nacia vespero, kiun kreis junaj kaj talentaj studentoj de la Kuba Akademio de Arto. Dum du horoj ili penis montri la muzik-kant-dancan diversecon de la Insulo de Libero kaj ili sukcesis! Tio estis neimitebla!

Kutime, la kongresa merkredo estas ekskursa tago. Kvankam mi multe vagis tra la Havano, sed ĉi tage mi



*D-ro I. Galajĉuk kun ĜD de UEA O. Buller*



*Arkitekturo de Havano*

vizitis muzeojn de du kubaj famuloj: Jose Marti (vd Saluton! 08/10 – red) kaj de fama kuba kaj usona (preskaŭ ŝikaga – Oak Park, IL) verkisto, Nobel-premiito (1954) E. Hemingway. Liajn verkojn mi legis en ukrainaj kaj rusaj tradukoj de la infanaĝo, antaŭ nelonge mi denove tralegis (nun – E-an version) lian La oldulo kaj la maro. Mi rekomendas legi ĝin al ĉiuj legantoj de "Saluton!". Bonega traduko de Fernando de Diego. Kaj ege impresis min la sidejo de la Kuba E-Asocio: tri-etaĝa konstruaĵo, ekipita por E-kursoj, kun kuirejo, aŭto (!), garaĝo (!) kaj Interreto! En Havano oni montras al vi lokon por la venonta monumento al L. Zamenhof.

Pri kubanoj. Ili estas senmalgajaj homoj. Se la okcidenta vivo (kaj ne nur) estas penetrata de "shoping"-konsumado, mon-perlaboro, ni ofte forgesas pri la regula homa interkomunikado, sed kubanoj ne forgesis tion. Ili vivas per emocioj, muziko. Kubanoj (kaj kubaninoj) aspektas bonege, speciale vespere, tio estas enigmo: de kie oni prenas monon por vestaĵo, perlaborante ofte nur $10 tage. Ili estas gajaj, dancantaj, ŝajnas, ke ili vivas senprobleme, havante nek Interreton, nek poŝtelefonojn, ili loĝas en iu limigita (komunisma) mondo meze de la Karibio. Ili ne rajtas viziti najbarajn landojn-insulojn, sed ili estas feliĉaj – Kubo estas reala Insulo de Libero, libero de la okcidentaj ĉiutagaj problemoj. Kubo estas la lando, vivanta pozitive!

Fakte, mi ne nur ripozis, sed ankaŭ laboris: mia kongresa prelego "La Monda Geografio de Kancero" aperos decembre en MIR (Medicina Internacia Revuo).

Do, adiaŭ Havano, saluton, la urbo de Marvirineto! *–D-ro I. Galajĉuk*

## Esperanto kaj Vizaĝlibro (VL)

Mi dezirus rekomendi al vi retejon, Facebook.com, interreta servo, por Esperanta uzado. Mi trovis multajn geesperantistojn per Facebook. Ĝi uzas fotojn, kiujn vi mem enmetus sur ĝi. Oni povas renkonti geesperantistojn, se vi dezirus aŭ ne dezirus. Per Facebook oni povas afiŝi mesaĝojn, fotojn de vi mem kaj de aliaj uzantoj de Facebook. Ankaŭ vi povas mesaĝi private. La prezidanto de UEA, Probal Daŝgupta, prezidintoj de UEA, Renato Corsetti kaj la aŭtoro de vortaro Esperanta, John Wells, uzas Facebook-on. Estas E-organizoj en Facebook de la mondo. Personoj de la mondo uzas diversajn lingvojn. Oni povas inviti aliajn aliĝi kun vi en Facebook kaj vidi vian informan sur Facebook. Laŭ John Wells oni devus voki Facebook-n kiel Facebook aŭ "fejs'buk'" kiel fremda vorto. Revu ĝiajn uzojn por en la estonteco, ĉar estas ankaŭ pro ni. *–Karlo Offutt*

## e-Enciklopedio de Esperanto

Enciklopedio de E-o eldonita en 1933 aperis pere de skanado ĉe: http://www.freeweb.hu/eventoj/steb/gxenerala_naturscienco/enciklopedio-1/encikl.htm Verŝajne estus bone, se nuntempe aperus la reviziita, korektita kaj plenigita versio de la Enciklopedio. Ĉu ne?

**Adreso:**

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

**Estraro:**

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – D-ro Les Kordylewski
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

**MEMBROKOTIZOJ**

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

**KUNSIDOJ**

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library**
**4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL**
**Kunvenoj komenciĝas**
**je 7 p.t. en la Suda**
**Konferenca Salono, unua etaĝo.**

**SEKVANTAJ KUNSIDOJ**

28an de Septembro – B. Stigers: "Trikado – ĉu nur hobio?"

26an de Oktobro – A. Kolganov prelegos pri utilkompanioj de Usono

23an de Novembro – H. Perez revenis kaj...

12an de Decembro – tradicia Zamenhofa Tago